**Saluton karaj gesamideanoj!**

## 55-a BOATADO. 31 de Majo - 2 de Junio 2024 en Palûŝė, Litovio

Esperanto klubo "**Juneco**" (urbo Vilno) organizas tradician **BOATADO**-n, kiu okazos en Paluŝe, situanta 5 km okcidenten de Ignalina, Ignalina distrikto en la Nacia parko de Aŭkŝtaitija.

Dum 3 tagoj ni ekskursos kaj traboatos pli ol 20 lagojn kaj lagetojn, riverojn kaj riveretojn. Vizitos muelejon de Ginuĉiai, kie okazos akvaj proceduroj sub la akvofala duŝo, en insulo de lago Baluoŝas ni festos naskiĝtagojn de naskiĝintoj, Baptado de unufojaj boatadantoj.

Ludoj, kantoj, lignofajro, varma vespermanĝo, bela naturo atendos vin ĉiuvespere en tendarlokoj.

Bonvolu preparu kulturan programon ankau por internacia vespero.

Dum Boatado viajn orelojn ĝojigos nur Esperantaj vortoj, ĉar aliaj lingvoj estos malpermesitaj kaj tion gardos la sekreta Verda Policisto.

**Aliĝo**: bonvolu aliĝu laŭ ebleco pli rapide, sendante aliĝilon al Marijus marijus.dilba@gmail.cpm : Nomo, familnomo, dato de naskiĝo, lando, urbo, el.poŝto, E-klubo, jaro de esperantiĝo, kioman fojon partoprenos, ĉu Vi havos propran tendon aŭ dormosakon.
**Loko kaj tempo de kolektiĝo** - la 31-an de Majo matene en urbeto Paluŝe, situanta 5 km okcidenten de Ignalina sur lagbordo de la lago Luŝiai. Ankaŭ eblas atingi Paluŝe la 30-an de Majo vespere, kai noktumi tie ĉe la lago en tendo.
**Loko**: de Ignalina flanko traveturi urbeton Paluŝe kaj en fino de Paluŝe turni dekstren cxe la lago, veturi 300m ĝis domo (boatejo). Tie eblas starigi autojn, nokti en tendoj, kiu venos pli frue.
**Trafiko (trajnoj)** - el Vilnius al Ignalina veturas trajnoj kaj busoj. Trajna vojaĝo daŭras ĝis 1h40min. Bileto kostas 7Eur. Se vi alvenos per propra aŭto, ĝin eblos starigi ĉe boatluejo en Paluŝe. Trajnoj el Vilno al Ignalina: bonvolu kontrolu ĝustan tempon.
**Malfermo** – la 31-an de Majo je la 12-a horo en Paluŝe sur lagbordo de la lago Luŝiai ĉe nia boatluejo.
**Fermo** - la fermo de la aranĝo okazos la 2-an de Junio denove en Paluŝe ĉirkaŭ je la 15-17 horo.
Atenton: pli malfrue komenci, (aŭ pli frue forlasi aranĝon) estos eble nur se Vi informos nin anticipe kaj kapablos mem atingi tendarejon ĉe vilaĝo Vaiŝniunai 31 de Majo vendrede vespere aŭ sabate matene (helpon peti ĉe Kostas aŭ Sarunas en boatluejo en Paluŝe), aŭ noktlokon ĉe Ginuĉiai sabate vespere. **Kotizo ne ŝangxiĝos.**
**Manĝado** – prenu tiom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, ke sufiĉu laŭ voje kaj por vi, kaj por via geamiko ☺. **Teon, supon kaj kaĉon zorgos kaj preparos ni, organizantoj**. Prenu ilojn kaj ujojn por manĝi, trinki teon.
Ni avertas, ke freŝa aero kaj intensiva remado mirakle plibongas apetiton. Vendejo laŭ voje estos nur en Ginuĉiai (Sabate tage).
**Noktado** – en tendojn kaj dormosakoj (aŭ proprajn aŭ luitajn).
**Programo** – detala tagordo de la aranĝo - en programlisto. Preparu nacian kulturan programon. Ankaŭ aktive partoprenu kun viaj preparitaj programeroj.
En la Baptado de unufojaj boatadantoj povos partopreni ĉiuj partoprenantoj.
**Kotizo kaj kaŭcio** – ĉiu partoprenanto surloke pagos kotizon kaj kaŭcion.
**Kotizo:**
1. Kotizo: por lernantoj/studentoj - **25 Eur**;
por laboruloj - **35 Eur**;
por familioj - rabato **-5 Eur/homo**
2. Kaucio **5 Eur**, kiu estos repagita, se Vi ne krokodilos dum la aranĝo kaj kaj agos laŭ reguloj de la Boatado;
3. Se Vi ne havas dormosakon, Vi povos ricevi, tio kostas **5 Eur**;
4. Se Vi ne havas tendon, Vi ricevos lokon en tendo, tio kostas **5 Eur** (nepagas tiu, kies tendo estas). Familio nepagas.
5. Se via tendo malgranda (1-2 loka) Vi pagas **5 Eur** (en Nacia parko kostas starigo de ĉiu, eĉ 1-loka tendo).

**Kaŭcio** estos repagita al ĉiuj disciplinemuloj dum la Fermo de Boatado.
**Okaze** de gravaj rompoj de renkontiĝa tagordo, fuŝigo, malaperigo, krokodilado, la kaŭcio aŭ parto de kaŭcio ne estos redonita. Pri tio okupiĝos Verda Policisto.
**Kion kunporti:** manĝaĵon, trinkaĵon, gantojn (por remado), varmajn vestojn, mantelon kontraŭ pluvo, sakojn kontraŭ pluvo por aĵoj, ilojn-kemikaĵojn kontraŭ kuloj/insektoj. Ne forgesu fortecon, bonan etoson kaj nepre venu! ☺.

Bonvolu dissendu tion informilon al viaj geamikoj, se ili planas boati, ĉar mi eble ne havas kontakton kun ili ☺.
**Boatado – bona ebleco lerni Esperanton, kontakti kun eksterlandaj esperantistoj, remi kaj ripozi en belega sovaĝa, neforgesebla naturo de Litovio.**
Gxis la revido en Boatado-2024! ☺
**Kontaktoj: Marijus Dilba (JUNECO Esperanto klubo)** marijus.dilba@gmail.com**, tel. +370 685 12244**